# Malreklam’
## de Sylvan Zaft

Malgraŭ la malsano de lia kor’,
(La egaj penoj spiri),
Malgraŭ la avertoj, preskaŭ en ĥor’,
(La fumo povas ŝiri)
Kontraŭ la dolor’ de la ekscio
(Amitinojn li forgesas)
Kontraŭ la memor’ de melodio
(La amemon li nun dresas)
Strebas ardaĵeto de l’ folio
(Pulmojn pentras malkolor’)
Akra gust’ venkas super ekkrio
(Sanespero estas for).